

INTERNACIA LERNEJA ESPERANTO-REVUO
SUB AŬSPICIO DE ILEI

SEPTEMBRO 1975



3-A JARO N-ro 1 (7)

Karaj geamikoj!

Pasis unu jaro, pasis ankaŭ la dua, kaj JUNA AMIKO ankoraŭ vivas. Dank' al via fidela apogo¹, la redaktistaro riskas² al-iri al la 3-a jar'kolekto, malgraŭ ke inflacio³ kreskas en la tuta mondo kaj, ke pluraj Esperanto-gazetoj staras sur la rando de abismo⁴. JUNA AMIKO ne estas escepto⁵. Ankaŭ ni bezonas fortan sub-tenon.

Ciam ankoraŭ ekzistas landoj, kie multaj junuloj lernas la Internacian Lingvon, sed ĉi tiuj ne povas aboni la revuon. Por helpi ilin kaj nian gazeton, necesas urĝe trovi la rimedon⁶ sur landa nivelo. Ni pensas, antaŭ ĉio, pri Pollando.

Fine, ni turnas nin al la instruistoj.

Karaj gekolegoj⁷, vi povas multe helpi al ni! Bon'volu instigi⁸ viajn lernantojn partopreni en diversaj aktivecoj kaj enigmoj de nia revuo. Via energio certe ne perdiĝos sen-rezulte.

Ni plu faras ĉion eblan por vi. Jen tiu ĉi numero aperas sur brila papero, en pli kolora preso. Ĝia plua pli-beliĝo de-pendas de via helpo.

Deziras, al ĉiuj legantoj, multan plezuron dum la legado

la tuta redaktistaro!


Pied-notoj sur la 3-a paĝo.



Rigardu sur la foton! Vi vidas dezerton¹. Tio estas la ruinoj² de japana urbo *Hiroŝima*. Unu bombo³, *unu-sola* atom'bombo kaŭzis tion.

La 6-an de aŭgusto 1945, je la 8-a horo kaj 15 minutoj, super *Hiroŝima*, eksplodis atombombo, kiu neni'igis la tutan urbon de 72 km² (kvadrataj kilometroj). En unu sekundo⁴ mortis 240.000 plenaĝuloj kaj infanoj, vundiĝis 160.000 personoj.

NENIAM PLU!



La domoj dis-flugis pro ventego, kaŭzita de la eksplodo. Homoj, kiuj staris 4 km for, estis ŝetitaj al la tero. Ĉio for-brulis pro varmego (7 000° ĝis 12 000° C). Homoj nigriĝis, haŭtoj⁵ ĉifoniĝis⁶.

La demona⁷ nubego flug'pendis je ĉirkaŭ 10 km alte. Nigra pluvo kun radio-aktivo⁸ falis torente⁹. La oleeca pluvo mortigis kaj brulvundis ĉion: homojn, bestojn, kreskaĵojn.

Terure! Tempo pasas, jaroj flugas, sed la post-signoj de la tragika¹⁰ atom'atako restas por ĉiam, en koroj, ĉe korpoj kaj sur la tero.

Neniam militu! Nenie batalu! Neniu malpacu!

Orfoj ploras: / „Tio estas nia krio, / tio estas nia preĝo, / por fari pacon en la mondo!”

Okumura-Rinzo (Japanio)

1. vasta sen-viva loko / 2. ruino: restaĵo de neniĝ'ita konstruaĵo / 3. granda eksplodaĵo / 4. 60-ono de minuto / 5. ekstera kovraĵo de la homa korpo / 6. ĉifono: ŝir'ita vesto / 7. malbon'vola, terura, timiga / 8. mortiga radiado / 9. tre dense / 10. tre malĝojiga.

PIEDNOTOJ DE LA 1-A PAĜO

1. sub-teno, helpo / 2. staras antaŭ danĝero / 3. sen-valor'iĝo de mono / 4. profund'eg'aĵo / 5. io alia ol la aliaj, ol la ceteraj / 6. maniero aŭ ilo / 7. sam'profesi'anoj / 8. vekaj interesoj.

MAJSTRO' DE ARTOJ



Moseo

Delfica

La Virgulino

1. homo, perfekta en sia laboro / 2. homo, kiu tranĉas ŝtonon aŭ alian materialon, por fari formojn de homoj k.t.p. / 3. homo, kiu faras planojn de domoj aŭ de aliaj konstruaĵoj / 4. ilo por tranĉi ŝtonon k.t.p. / 5. valora blanka ŝtono, ofte uz'ata por skulpti / 6. malgranda preĝejo / 7. supera estro de la Rom'katolikoj / 8. sukcesis konvinki pri io / 9. juĝitoj for-senditaj por puno / 10. formo de persono / 11. loko de sen-fina puno / 12. loko inter la Cielo kaj la Infero, kie oni devas pagi pro siaj malbonaj faroj / 13. granda kaj bela ĉefa preĝejo.



Antaŭ 500 jaroj, naskiĝis unu el la plej grandaj artistoj de la mondo, *Michelangelo BUONARROTI* (:mikelanĝelo būonaroti). Li estis sam'tempe pentristo, skulptisto², arkitekto³ kaj poeto.

Jam dum sia juneco, li estis fama skulptisto. Li faris la belegan skulptaĵon „*La Pietà*” (= la kompato) kaj la grandan „*Davidon*”, kiam li havis 23 aŭ 24 jarojn. Oni rakontas pri ĉi tiu, ke la tiama urb'estro de *Florenco*, kiu kredis sin sci'anto pri la artoj, diris, ke la „*David*” havas tro longan nazon. Michelangelo tuj prenis ĉizilon⁴ kaj iom'ete da polvo de marmoro⁵, kaj supren-iris al la kapo de la skulptaĵo. Li ŝajnis labori per la ĉizilo, kaj faligis iom da polvo el la mano, sed ne tuŝis la nazon. Kiam li malsupren-iris, la urbestro diris: „Multe pli bone. Vi donis al ĝi vivon!”

Michelangelo okupiĝis, dum kvar jaroj, pri la pentrado de la plafono de la *Sistina Kapelo*⁶ en la *Vatikano*, kaj multajn jarojn poste, laŭ peto de la papo⁷, li laboris ĉe granda pentraĵo sur muro de la sama kapelo. Ĉi tio montras la „*Finan Jugadon*”, kaj en-havas mem-portreton de la artisto. Ĝi enhavas ankaŭ almenaŭ unu portreton de kort'eg'ano de la papo. Oni diras, ke ĉi tiu preskaŭ persvadis⁸ la papon, nul'igi la mendon pri la pentraĵo. Por puni lin, Michelangelo pentris lin inter la kondamnitaj⁹, kaj donis al li la orelojn de azeno. La kortegano forte plendis al la papo, kaj petis lin, nul'igi almenaŭ tiun figuron¹⁰. Sed la papo, kiu jam komprenis la valoron de la laboro de Michelangelo, demandis:

„Kien li metis vin?”

„En la Inferon¹¹”, respondis la kortegano.

„Estas bedaŭrinde”, diris la papo. „Se vi estus en la Purgatorio¹², mi povus el-igi vin; sed el la Infero — kiel vi scias — oni neniam povos el-iri!”

Kiel arkitekto, Michelangelo desegnis grand'parte la nunan formon de la katedralo¹³ de *Sankta Petro*, kaj aparte la grandan kupolon, kiun multaj konsideras la plej grandioza en la mondo. Diversaj aliaj famaj konstruaĵoj en *Florenco* kaj en *Romo* atestas pri la ekster-ordinara kapableco de ĉi tiu genia artisto, kiu mortis en la jaro 1564.

J. H. Sullivan (Anglio)

Tibor Sekelj (Jugoslavio)

Konkero¹ de la monto Akonkagvo²

Ni ellit'igis je la 3-a horo, fru'matene. Mi skribis leteron al nia ĉefo, *Johano G. Link*. Ĝi tekstis³ jene:

„*Hodiaŭ matene, je la 4-a horo, ni ek-marŝis de la bivako⁴ 5850, por esplori la vojon al la monto-pinto. Se io ajn okazos al ni, ni solaj respondecas.*

La 13-an februaro 1944.

Tibor Sekelj, Mario Bertone, Johano Zechner”

... Ĉirkaŭ la 9-a horo, kiam ni atingis la rokon⁵ de *Martinez*, ni manĝis kelkajn sekajn prunojn⁶, sed ne kun bona apetito. Post unu horo, ni venis al neĝo-kampo, kiun ni devis tra-vadi⁷ laŭ ĝia tuta larĝeco de proksimume 100 metroj. Ĉe ĉiu paŝo, ni en-profundiĝis ĝis la koksoj⁸. Fine, ni venkis ĝin; kaj ni eksidis, por ripozi dum kelka tempo.

Ni staris antaŭ la fina atako. La lasta parto estas iom kruta⁹ deklivo¹⁰, semita per rokoj, kiujn oni devas sur-grimpi¹¹, uzante la forton de la manoj. Vera estas la oni-diro, ke la monto *Akonkagvo* ne postulas¹² profundajn teknikajn konojn. Sed, por venki la malaltan aer'premon kaj la maldens'econ de la aero, necesas kolekti la tutan forton de la volo, kaj sub-meti ĉion en la unu-nuran penson firman¹³ kaj sen-kondiĉan: *supren!*

Tie, ni komprenis tiujn, kiuj re-iris de je 50 metroj, sub la pinto. Ĉiu el la rokoj, sur kiuj ni devis supren-grimpi, el-ĉerpis¹⁴ nian forton. La pinto (kiu ne plu ŝajnis esti pinto, sed siple: rekta

„... ni venis al
neĝokampo,
kiun ni devis
travadi laŭ
ĝia tuta larĝeco.
Ĉe ĉiu paŝo,
ni enprofundi-
ĝis ĝis
la koksoj.”





„Ni ekstaris
kaj serĉis en
la tornistro la
Argentinan flagon,
kaj ni hisis ĝin
solene,
kune kun la
Esperanto-flago.”

linio, kie finiĝas la monto) ŝajnis troviĝi je du paŝoj de ni. Per pleja klopodo, efektiviĝebla nur dank' al la entuziasmo pro proksima venko, ni tra-iris la lastajn metrojn; kaj jen, fine, ni staris sur la plej alta supro de la Amerika kontinento!

Ni ĉirkaŭ-brakis nin reciproke kaj gratulis unu la alian, kun granda emocio¹⁵. Kiel venkintoj¹⁶, ni sur-tretis¹⁷ la „kapon de la giganto¹⁸”. Tio estis la unua sento. Poste, ni falis teren kiel tri malplenaj sakoj; kaj ni restis tiel, dum kelkaj minutoj, sen diri eĉ unu vorton.

Estis la 2-a horo. La suno brilis helege. La vento fortege balais¹⁹ la supron.

Ni ek-staris kaj serĉis en la tornistro²⁰ la Argentinan flagon, kaj ni hisis²¹ ĝin solene²², kune kun la Esperanto-flago.

Kio estas videbla de tie supre? — Tio estas unu el la plej oftaj demandoj, kiujn oni direktas al ni. La plej interesa, kion oni povas observi²³ de la supro, estas la dua pinto de la monto *Akonkagvo*, kiu situas²⁴ sude, je unu kilometro dis-de la ĉefa pinto, kaj kiu estas nur 30 metrojn malpli alta. Ne-trair'ebla akra kresto²⁵ apartiĝas la du pintojn.

Malsupre, tre malproksime, estas videblaj ĉiuj altaj monto-pintoj. Jen estas *Mercedario*, kies altecon ni apenaŭ superas; jen *Katedralo* kaj *Korno* kaj *Tolesa*. De tie ĉi, ili ŝajnas esti tre malgrandaj. Inter ili, vidiĝas valoj; kelkaj, el ili, estas ornamitaj per bril'fadeno²⁶ de rivero, kaj per blankaj supraĵoj de glaciejoj. Inter ili, mil metrojn sub niaj piedoj, moviĝas kaj inter-miksiĝas blankaj nuboj, kies supran parton pri-lumas la suno.

En la fono²⁷, malproksime, pli-mult'igas la montoj, jam perd-
antaj la videbl'econ. Malantaŭ ili, for-viŝigas aliaj malaltaj kaj
blu'ecaj monto-ĉenoj.

Ĉe la alia flanko, oni diras, kiam la atmosfero²⁸ permesas tion,
videbla estas la oceano *Pacifiko*. Ni ne havis tian feličon ĉar, ok-
cidente, estis multe da nebulo²⁹, kiu mal-obl'igis vidon al tioma
distanco. Ni staris je 150 km dis-de la oceano.

Mallonge, la vidaĵo estas mirinda kaj, sen-dube, la nun-tempa
homo malofte — dum sia vivo — havas okazon ĝui ion simile
grandiozan.

Laŭ la romano „*Stormo super Akonkagvo*”

1. okupo per batalo aŭ per granda forto-sterĉo / 2. la plej alta monto-
pinto en Ameriko / 3. skribaĵo en-havis / 4. nokta ripoz'ejo de, ekzemple,
soldatoj / 5. ŝtonego / 6. dolĉa blua frukto / 7. malfacile tra-iri / 8. korpo-
partoj ambaŭ-flanke ĉe la korpo-mezo / 9. preskaŭ vertikala / 10. monto-
dorso / 11. iri per-mane kaj per-piede / 12. volas nepre bezoni / 13. forta;
fiksa / 14. for-prenis; mal-fort'igis / 15. profunda sento / 16. tiuj, kiuj
venkis / 17. per-piede premis / 18. grandegulo / 19. ordinare: purigi plankon
per speciala ilo / 20. dorso-sako de ekskursanto / 21. supren-tiris flagon /
22. kun sento pri festo / 23. atente ekzameni / 24. troviĝas; staras / 25. ruĝa
el-kreskaĵo sur la kapo de koko / 26. maldika ŝnuro por kudri / 27. la
plej malproksima regiono / 28. aer'tavolo ĉirkaŭ la Tero / 29. vaporo en
la aero, en la atmosfero.



● En la konkurso de la januara
numero de JUNA AMIKO, parto-
prenis sukcese 15 junaj legantoj
el Hungario, Ĉeĥoslovakio, Sovet-
unio kaj Hispanio. Ĉu, en aliaj
landoj, la junaj amikoj ne legas
nian gazeton?

Jen la sukces'intoj:

LA RUBRIKON¹ GVIDAS:

Josef Chvosta (:ĥvosta)
Engelsova 289,
290 01 POĎĚBRADY
Ĉeĥoslovakio

*Sendu ĉiun korespondaĵon
rekte al tiu adreso!*

Tibor Szabadi kaj Ēva Aubry el
Hungario; *Miroslav Hromas, Fran-
tišek Adamik, Eva Stavinohová* kaj
Marta Gregorová el Ĉeĥoslovakio;
*Nataša Fomenko, Maimu Sepp, Igor
Moisejev, Elena Igorevna Latiseva,
Tiiu Knaps, Aime Kalamees, Heiki
Kalam* kaj *Kuido Heinsalu* el Sovet-
unio; *Guadalupe Círrera Pedrola* el
Hispanio.

● Novaj kluboj:

KJA/5 „Verda kolombo²”. St. Janusiewicz, 3 maja 38 m 6, PL 41-800 ZABRZE, Pollando (20 anoj).

KJA/6 Lernantoj de agrikultura teknikumo *Georgi Dimitrov*, U. Oborište, Peŝtera, Bulgario.

Vigle sendas siajn raportojn KJA/2 „*Gajaj humoruloj*” el Berlino, GDR.

● Nova konkurso por ĉiuj legantoj de JUNA AMIKO:

Mi prezentas heroojn el famaj libroj. Sendu al mi la nomon de la aŭtoroj³, kaj la titolon de la libroj en via gepatra lingvo kaj en Esperanto. Skribu al mi, ĉu vi legis la libron en Esperanto, aŭ ĉu vi nur tradukis la titolon. Se la verkisto havas plurajn librojn kun la samaj herooj, nomu nur unu titolon!

OLEG KOŜEVOJ: juna soveta partizano⁴, kiu batalis kun siaj amikoj kontraŭ naziaj⁵ germanaj soldatoj dum la dua monda milito.

SHERLOCK HOLMES (:ŝerlok holms): mond'konata detektivo⁶, kiu, kun sia amiko *Watson*, solvas multajn problemojn⁷.

MAUGLI: infano, kiu vivis kun lupoj⁸, kiuj edukis lin.

OLD SHATTERHAND (:ŝatrhand) kaj VINNETOU (:vinetu): blankulo kaj ruĝulo. Ili estas amikoj kaj batalas kontraŭ ĉia maljustaĵo⁹.

TARZAN: infano, kiun edukis simioj. Kiel plen'kreska viro, li estis tre forta kaj lerta.

JANCSI (:janĉi): juna paŝtisto de ŝafoj, kiu fariĝis reĝo de feolando¹⁰.

CYRUS SMITH: oficiro, kiu, kun siaj kvin amikoj, for-kuris en balono¹¹ kaj vivis, dum multa tempo, sur insulo en la oceano Pacifiko.

ŜAHARAZADA: ŝi rakontis al sia fratino *Dinarzad* fabelojn, kiujn eĉ la edzo kun-aŭskultis. (La libro ne havas aŭtoron.)

SANCHO PANZA (:sanĉo): fidela servisto de sia iom frenezeta¹² estro.

JOSEF ŜVEJK: konata soldato el la unua monda milito.

HARPAGON: fama avarulo¹³ en franca teatraĵo.

Sendu la solvon al la supra adreso, ĝis la 15-a de februaro 1976.

1. parto aŭ angulo en gazeto / 2. speco de flugema hejma birdo, malpli granda ol kokino / 3. verk'isto de libro; kre'into / 4. speco de soldato / 5. fidela al la ideoj de Hitler / 6. kaŝ'policano / 7. demando enigma aŭ malfacila / 8. sovaĝ'hundo / 9. justa: ver'ama / 10. feo: fabela bonulo / 11. gaso-plena g'lobo, kiu leviĝas en la aeron / 12. malsaĝ'eta / 13. tro-ŝpar'ema viro.



WIELICZKA

W. Zytynsky (Zytynski) Pollando

Fabeleca

sub-tera mondo


Preskaŭ neniu el la ekster-landaj turistoj¹, kiuj vojaĝas al Krakovo, preter-lasas la okazon viziti la mirindan mondon de la fama salminejo² en Wieliczka (:vjelička). Ĝi estas malgranda urbeto, 15 kilometrojn sud-oriente de Krakovo (22 minutoj da veturo per elektra vagonaro).

La salminejo en Wieliczka apartenas al la plej malnovaj minejoj de Eŭropo. Ĝi estis fondita en la 11-a jarcento kaj, de tiu tempo, estas sen-ĉese ekspluatata³.

Ĝia profundeco atingas 333 metrojn. La subteraj pasejoj estas ĉirkaŭ 120 kilometrojn longaj. En la fin'ekspluatita parto (135 metrojn profunda), troviĝas unika muzeo: multaj salonegoj⁴ kun naturaj kaj artaj skulptaĵoj⁵ kaj reliefoj⁶. Ĉi tie, troviĝas mond'fama unikaĵo: la „Kristala Groto”⁷, plena de miriga fabeleca brilo, kaj la „Kapelo⁸ de Sankta Kinga” (vidu ĝin sur la foto), adorata⁹ kiel patronino¹⁰ de salministoj. En la profundeco de 130 metroj, troviĝas sanatorio¹¹, kie oni sukcese kuracas malsanojn pro alergia¹².

Kaj... jen estas ankaŭ la lifto, kiu — post kelk'hora promeno tra kristaloj kaj jarcentoj — re-levas la vizitantojn supren, al la ekstera mondo.

1. homo, kiu vojaĝas kun celo de plezuro / 2. subtera fosaĵo por el-tiri riĉaĵon de la tero / 3. ekspluati: preni utilon / 4. ĉambrego / 5. arta verko el ŝtono aŭ metalo / 6. skulptaĵo, sur muro, nur parte el-stara / 7. kavaĵo, malplenaĵo en monto / 8. preĝejo / 9. tiu, kiun oni forta-kore amas / 10. patrono: homo, kiu defendas kaj helpas iun / 11. re-san'ig'ejo / 12. alergia: malsaneca sent'emo al io.






Diverseco de lingvoj

„KIEL VI FARTAS?“

Por igi videbla, certa-grade¹, la grandan diversecon de la lingvoj en la mondo, jen listo² da 21 diverslingvaj demandoj tre simplaj, kiuj signifas: „Kiel vi fartas?“



1. Apa kabar?
2. Ce mai faceti?
3. Come sta?
4. Comment allez-vous?
5. Como astá?

6. Como está usted?
7. Habari gani?
8. Hoe maakt U het?
9. Hogy van?
10. How are you?
11. Hur står det till?
12. Hvernig hafið þér það?
13. Hvordan går det?

14. Hvordan har De det?
15. Jak se máte?
16. Jak się powodzi?
17. Kako ste?
18. Kiel vi fartas?
19. Mitä kuuluu?
20. Nasilmiz?
21. Wie geht's?

Jen alfabetita listo de la lingvoj, al kiuj rilatas la 21 ĉi-supraj demandoj: angla, ĉeĥa, dana, franca, finna, Esperanto, germana, hispana, hungara, indonezia, islanda, kisuaheli (Afrika lingvo), kroata, nederlanda, norvega, pola, portugala, rumana, sveda kaj turka.

Sendu vian respondon al *s-ro Albert Lienhardt*, 24 avenue de Riedisheim, F-68100 Mulhouse (Francio), indikante³ la lingvojn,

kiuj korespondas al la diversaj numeroj. Ĉiu respondinto⁴ ricevos rekompenco⁵. La plej bona respondo ricevos ekzempleron de la sukcesa legolibro „Amuzaj dialogoj⁶ en Esperanto“. Limdato: 31. 01. 1976.

Kiom da lingvoj vi povas re-koni aŭ diveni?

A. Lienhardt (Francio)



1. grado: ŝtupo, paŝeto sur mezurilo /
2. nomoj aŭ ekzemploj en certa vic'ordo /
3. montrante precize / 4. persono, kiu respondis / 5. premio, donaco / 6. interparoloj.

ABC
POR KOMENCANTOJ



La redaktistaro el-kore gratulas al nia fidela kun-laboranto VOJTECH HEIMLICH (:hajmlif) okaze de lia 60-jar'igo. Ni deziras al li daŭran sanon, feliĉon, kaj esperas plue ricevi de li multajn orel'plaĉajn Esperanto-kantojn.



Al koro... koron!

Versoj de Ludmila Jevsejeva

Muziko de Vojtech Heimlich

Maestoso *mf*

Post ja-ro re-e pa-sas jar', kaj ni de-no-ve es-tas
 ku-ne. En la in-ter-na-ci-a rond', al
 pa-co ser-vas ni ko-mu-ne. En pa-co ser-vas ni ko-mu-ne.

Post jaro ree pasas jar',
 kaj ni denove estas kune.
 En la internacia rond',
 al Paco servas ni komune.

Nin ne dis-igas nigra mort',
 pli fortas amo ol atomo¹.
 Ni gardu teron de eksplod',
 ĝi donis vivon al la homo.

Nin proksimigas „verda stel' ”,
 simbola¹ signo de fratiĝo.
 Al koro... koron! Vokas ni
 impete², verve³, sen laciĝo.

Post jaro ree pasas jar',
 kaj ni denove estas kune.
 En forta geamika rond',
 al Paco servas ni komune.

1 simbolo: objekto, kiu vekas samajn penson kaj senton en ĉiu homo /
 2. energie / 3. kun entuziasmo / 4. ĉi tie: atoma bombo: la plej terura eks-
 plodaĵo.

GARDISTOJ DE VISKIO¹

Granda magazeno² de viskio, en *Skotlando*, estas gardata³ de cent anseroj⁴. La ideo venis de la fabrikestro, bona konanto de la antikva⁵ *Romo*. Sia-tempe, laŭtega grakado⁶ de „sanktaj” anseroj vekis la Romanojn, kiam malamikoj venis en la urbon. La fabrikestro trovis, ke ĉi tiuj flugil’havaj birdoj restas en silento, kiam konata, por ili, persono preter-pasas; kaj male, ili el-igas furiozan⁷ bruon ĉe ek-apero de nekonato.



interesajoj

1. speciala ebriga trinkaĵo / 2. granda vendejo aŭ tenejo / 3. tio, kion oni gardas / 4. granda korto-birdo, simila al aĉaso / 5. pra-tempa / 6. blekado de ansero / 7. sen-brida; forta / 8. ŝtata ordono, malpli grava ol leĝo.

PRI LA NAZ'TUKO

Antaŭ 400 jaroj, ankoraŭ ne ekzistis naztukoj. En la fino de la 16-a jarcento, kiam ili aperis, oni rigardis la naztukojn kiel ornamaĵon, kaj oni donis al ili la plej diversajn formojn. Poste, en 1785, la franca reĝo *Ludoviko la XVI-a* ordonis, per dekreto⁸, ke, en la estonteco, ĉiuj naztukoj havu kvadratan formon.



KASTORA LETERO

De J. H. SULLIVAN

Miaj karaj Kastoroj!

Mi esperas, ke vi ĉiuj pasigis tre belajn feriojn¹, kaj nun sentas vin pretaj re-komenci la laboron. Mi deziras al vi multe da sukceso en viaj studoj!

En tiu ĉi Kastora Letero, vi povas legi interesan artikolon. Certe ĉiu, el vi, scias, ke doktoro Zamenhof, la aŭtoro² de nia lingvo Esperanto, naskiĝis en Bjalistoko, Pollando. Hodiaŭ vi povas legi artikolon pri tiu urbo, verkitan de Arĝenta Kastoro, Anna Zaman. Ŝi loĝas tie. Mi esperas, ke la artikolo interesos vin.

Jen unu plia afero: Ne forgesu skribi, al mi, pri viaj ferioj, pri io ajn, kio okazis al vi, kaj pri io ajn, kio povas interesi la aliajn Kastorojn! Mi certe aperigos ion interesan, laŭ la eblecoj de la spaco. Sincere salutas vin la

ĈEFA KASTORO

NIAJ PROMOCIOTOJ³

La sekvantaj Kastoroj atingis pli altan gradon inter la fino de novembro 1974 kaj la mezo de aprilo 1975, kiam mi verkis ĉi tiujn paĝojn:

Fariĝis ARGENTAJ KASTOROJ

373 Christine FOURNIER (Francio)

530 Anna ZAMAN (Pollando)

Fariĝis BRUNAJ KASTOROJ

516 Mária Benkő (Hungario)

518 Mária Károly (Hungario)

519 Mihály Kurucz (Hungario)

520 Ágnes Lévai (Hungario)

521 József Madaras (Hungario)

522 Mihály Misovics (Hungario)

523 Katalin Pataki (Hungario)

524 Katalin Spirek (Hungario)

526 Erika Szabó (Hungario)

538 Marie Sidláková (Ĉeĥoslovakio)

Mi gratulas ĉiujn promociitojn!

BJALISTOKO

Bjalistoko estas unu el la pli novaj urboj de Pollando. Oni povas trovi la unuan historian mencion⁴, pri ĝi, en dokumentoj⁵ de la jaro 1426. Komence, Bjalistoko estis kamparo kaj, nur en 1799, ĝi ricevis la urbajn rajtojn. En la dis-volvo de Bjalistoko, Jan Klemens Branicki ludis la plej gravan rolon. La urbo dankas al li pro multaj vidindaj konstruaĵoj.

Inter ili, menciindaj⁶ estas la „Palaco de Branicki”, la tiel nomata „Wersal Podlaski”, „Armilejo⁷”, „Urbo-domo”, „Framasonejo⁸” kaj „La domo de la Ĉeval’ejestro”.

En la 19-a jarcento, Bjalistoko iĝis grava industria urbo kun multaj metal’fabrikaj, teksejoj⁹ kaj tanejoj¹⁰. Dum la dua monda milito, ĝi iĝis preskaŭ detruita¹¹; sed, de post 1944, ĝi estis intense¹² konstruata. Ekstis novaj kvartaloj¹³ kun modernaj stratoj kaj domoj. Oni starigis multajn elementajn, mezajn kaj fakajn lernejojn; kaj, krome, estis malfermitaj tri alt’lernejoj: medicina¹⁴ akademio¹⁵, inĝeniera alt’lernejo kaj filio⁶¹ de la Varsovia Universitato kun kelkaj fakoj. Krom tio, troviĝas tie tri muzeoj, unu teatro, nova filharmonio¹⁷, multaj kinejoj kaj belega urbo-parko.

Por esperantistoj, estas vidindaj, en Bjalistoko, la memor’signoj pri L. Zamenhof: (a) memor’tabulo al la kreinto¹⁸ de Esperanto. Ĝi troviĝas sur la muro de nova domo, kiu staras sur la loko de la iama naskiĝdomo de Zamenhof; (b) la pri-naskiĝa atesto de Zamenhof, konservata en Vojevodio¹⁹ Arkivo²⁰; (c) Esperanto-anguleto en la Vojevodio Muzeo; (ĉ) unu strato kaj la lernejo n-ro 23, kiu portas la nomon de Zamenhof, kaj (d) malgranda placo, sur kiu, la 14-an de aprilo 1973, estis starigita la busto²¹ de la aŭtoro de Esperanto.

Mi tre ŝatas mian urbon, kiu, tago post tago, iĝas pli kaj pli bela; kaj mi invitas ĉiujn ekster-landanojn viziti ĝin — precipe esperantistojn, por kiuj ĝi ja estas speciale rava²², ĉar ĝi estas la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof, la kreinto de nia lingvo.

Argenta Kastoro ANNA ZAMAN

ATENTU!

Se vi ankoraŭ estas *Kastoreto*, kaj havas membro-numeron ĝis 583, vi devos atingi la gradon de *Bruna Kastoro* en januaro 1976.

AL NE-KASTOROJ

Ĉu vi deziras esti *Kastoro*? Por an’iĝi, necesas lerni nur la tri-opan promeson de la Klubo, kaj parkere ripeti ĝin al via Esperanto-instruisto. Tiam, petu lin skribi al la *Ĉefa Kastoro*, 3 Berwick Avenue, URMSTON, Manchester M31 1PS, *Anglio*, donante vian plenan nomon kun adreso, dato de naskiĝo kaj sekso²³, kaj atestante, ke vi parkere ripetis la promeson kaj komprenas ĝian signifon. La promeso estas:

„Mi promesas diligente lerni Esperanton.”

„Mi promesas ĉiam porti la verdan stelon.”

„Mi promesas ĉiam konsideri alian homon kiel fraton, de kiu ajn raso²⁴, koloro aŭ kredo li estas.”

Mi sendos al vi atestilon de membreco, en la provizora grado *Kastoreto*, kaj informojn pri tio, kiel atingi la gradon *Bruna Kastoro*, kiu rajtigos vin ricevi la belan kluban insignon. Lerne la promeson jam nun, kaj faru la unuan paŝon al plena membriĝo!

AL LA INSTRUISTOJ

Bon'volu instigi viajn gelernantojn verki por la Kastoro Letero. Mi ĉiam preferas havi artikolojn, verkitajn de la Kastoroj mem, ol de mi! Kial ne fari konkurson el tio, kaj sendi la plej bonan artikolon al mi, por ke mi elektu? Sed bonvolu instigi ilin!

ABC
POR KOMENCANTOJ



1. pluraj liber'tempaj tagoj / 2. kreinto / 3. tiuj, kiuj atingis pli altan gradon / 4. diraĵo aŭ skribaĵo / 5. konserv'inda skribaĵo / 6. indaj je mencio; ne-ordinaraj / 7. ejo por militiloj / 8. ejo de framasonoj (membroj de sekreta societo) / 9. fabriko de materialoj, el kiuj oni faras vestojn / 10. ejo, kie oni faras ledon el feloj / 11. tio, kion oni neniigis, nulgis / 12. tre diligente / 13. urbo-parto / 14. medicino: scienco pri kuracado / 15. alt'lernejo / 16. aparta parto / 17. tre bona muzika societo / 18. iu, kiu kreis / 19. vojvodio: ĉiu el la partoj de Pollando / 20. loko, kie estas dokumentoj / 21. kapo kaj brusto de homo / 22. entuziasmiga / 23. la diferenco inter viroj kaj virinoj / 24. granda grupo da homoj, kiuj de-venas de samaj pra-patroj.

Estona popola rakonto

Saĝa servisto

Riĉulo sendis sian serviston porti al li vinon. Li donis al la servisto trinkujon, sed monon li ne donis.

„Kiel aĉeti vinon sen mono?” demandis la servisto.

„Por mono, ĉiu povas aĉeti”, respondis la mastro. „Saĝa homo sci'povas aĉeti sen mono.”

La servisto for-iris. Post kelka tempo, li revenis kaj donis al la mastro la saman malplenan ujon.

„Trinku, mastro!” li diris.

La mastro fariĝis furioza. „Kion mi trinku, se la trinkujo estas malplena?”

„Trinki vinon, se ĝi troviĝas en la trinkujo, povas ĉiu”, respondis la servisto. „El trinkujo malplena, sci'povas trinki nur homo saĝa.”

Laŭ J. Ojal (*Estonio*)

^

Romano Grinspan (Sovetunio)

Sen kompliko¹, sen koliko² Esperanto - gramatiko

Substantivo³

Tiaj vortoj, kiel *homo*, / *skribo*, *ribo*⁴, *pomo*, *domo*, / *neĝo*, *seĝo*, *reĝo*, *vivo* — / portas nomon substantivo. / Do memoru — tio gravas! — / ke finaĵon „o” ĝi havas. / Se „j”-o sekvas, „o” vokalon⁵, / ĝi signifas la pluralon⁶. / Jen ekzemploj: *tri infanoj*, / *viroj sep*, *dek lernejanoj*,

pluraj libroj,
kelkaj tigroj,
multaj kantoj,
mil lernantoj.

Ludmila Jevsejeva (Sovetunio)

Aŭtuna kalendaro

De sur kverko⁷
ŝiras vento
folieton post foli'.
Proksimiĝas
blanka vintro
ĉiu-tage pli kaj pli.
Kvazaŭ peza
sako, pendas
griza nubo super lag'.
Baldaŭ venos,
de aŭtuna
kalendaro, lasta tag'.

1. malsimpl'eco / 2. ventro-doloro / 3. o-vorto / 4. frukto-speco / 5. sono-speco / 6. multe-nombro / 7. alta arbo-speco kun malmola kaj valora ligno.

Kas'ludo per vortoj

Por klarigi la taskon, mi prezentas ekzemplon. Jen estas frazo: *Li konsentis kaj diris: „Jes, per Antonio mi re-sendas la libron.”* Kian libron? Ĉu vi scias? Esperanto-libron. La vortoj: *JES, PER ANTONIO* entenas tiun vorton kaŝite.

Kaj nun, aŭskultu la sekvan-tan rakonton:

„Post tra-lego de mia fidela amiko, libro pri aventuroj, mi malfrue ek-dormis, kaj havis teruran sonĝon.


En akompano de doktoro Z. mi ek-iris ĉasi. Mi ordinare — vi ja scias — timas nenion. Kun dolĉa-suka melono en la fortikaj¹ manoj, ni iris viziti groton², kiu estis timiga pro malhele fantomaj³ vidaĵoj. Tiam mi vekigis pro timo. Pri la vereco de miaj vortoj, atestu doktoro Z.”

Divenistoj de sonĝoj malkovris la kaŭzon.

Ĉu vi ankaŭ divenos ĝin?

(Solvo sur la 23-a paĝo)

1. forta / 2. malplen'ajo en mon-to / 3. fantomo: ŝajne re-aparanta mortinto.



Faru vortojn el la literoj, kiu estas en la rondetoj! Kons-truu ilin tia-maniere, ke la li-teroj estu sin-sekvaj laŭ la li-nioj. Ekzemploj: *taso, kato, par-ta*. Gajnos tiu, kiu faros plej multe da vortoj.

Poste, oni povas, kompren-eble, ŝanĝi la literojn, laŭ de-ziro.

D. Berndt (GDR)

NI INFORMAS VIN,
KE JAR'ABONO AL
JUNA AMIKO
DAŬRAS DE
SEPTEMBRO ĜIS
APRILO

* * *

AKIRU NOVAJN
ABONANTOJN
AL JUNA AMIKO!

KIOM AĜAS LA ŜIPESTRO?

Jen estas demando, kiu ofte el-vokas ridon pro absurda¹ deziro. (Ekzemplo: Per ŝipo veturas 268 homoj. La direkt'il'isto ebriiĝis² je la 7-a horo matene. Kiom aĝas la ŝipestro?)

Sed mi fakte divenos, kiom aĝas la ŝipestro, kondiĉe ke vi konas lian aĝon.

Diru al viaj kun-uloj: „*Elektu*, por vi, *ŝipestron*, kiu havas laŭplaĉan aĝon!”

La amikoj elektas — laŭ sia gusto — *ŝipestron*, ĉu junan, ĉu maljunan, ĉu meze aĝan.

Poste, diru al ili: „*10-obliĝu la aĝon* de la ŝipestro! Kiam vi estas pretaj, *elektu nombron*, laŭplaĉe, inter 0 kaj 9!”

Poste daŭrigu: „Kaj nun, *9-obliĝu* la elektitan unu-ciferan³ nombron kaj, fine, *subtrahu⁴ la produkton⁵ el la 10-oblo* de la aĝo! Kiam vi estas pretaj, diru al mi la finan nombron (la diferencon⁴)!”

El la diferenco, la aĝo estas divenebla.

Ekzemplo: Iu elektis *ŝipestron*, kiu havas 47 jarojn. La 10-oblo estas: 470. La elektita unucifera nombro estu ekzemple: 4. 9-oblo de 4 estas: 36. Kaj fine: $470 - 36 = 434$. Jen la diferenco, per kiu oni povas veni al la aĝo. Kia maniere?

La lastan ciferon (ĉi tie: 4) al-donu al la antaŭ-lastaj (ĉi tie: 43): $43 + 4 = 47$.

La nombro povas konsisti el iom ajn da ciferoj; ĉiam la lasta aldoniĝas al la antaŭlastaj.

Tia unucifera nombro estas elekt'enda, kiu rezultigas pozitivan⁶ diferencon. Se, ekzemple, iu elektis 3-jaran *ŝipestron*, la elektita unucifera nombro ne devas esti pli granda ol 3.

En tiu ĉi maniero, oni povas diveni naskiĝan tagon, jaron, nombron da klasanoj k.t.p.

1. kontraŭa al la reguloj de la pensado / 2. ebria: malsaneta pro tro da vino aŭ pro simila trinkaĵo / 3. cifero: bildo de nombro / 4. ekzemple: $5 - 2 = 3$, tio estas subtraho; kaj 3 estas la diferenco / 5. rezulto de obligo / 6. ĉi tie: nombro pli granda ol 0.

Théophile Cart (:teofil kart)

La deveno de la arta muziko

Greka fabelo

En antikvaj¹ tempoj, longe antaŭ Homero², vivis juna paŝtisto³, kiu paŝtis sian ŝafaron sur la herbo-riĉaj deklivoj⁴ de Parnaso⁵. En iu tago, li tranĉis kanon⁶, faris en ĝi truetojn, kaj el-tiris el ĝi rave⁷ dolĉajn sonojn. Plena je ĝojo, li invitis siajn amikojn fari la samon.

Sed ili mokis lin: „Ĉu ne sufiĉas la kanto de la birdoj kaj la melodia⁸ voĉo de la junulinoj? Por kio ni bezonas novan muzikon?” Sed la paŝtisto persistis⁹; tial, junaj paŝtistoj el Parnaso iris fari demandon al la saĝuloj de Grekujo.

„Ho, respektindaj¹⁰ saĝuloj”, ili diris, „ĉu arta muziko estas ebla?”

Kaj la respektindaj saĝuloj, post longa pensado, respondis fine, per serioza voĉo:




„Ne, paŝtistoj, tia muziko estas neebla, ĉar ĝi neniam ekzistis. Kaj, eĉ se ĝi estus ebla, ĝi estus kiel barbara¹¹ lingvaĉo: nur sovaĝa miksaĵo de sonoj, ne-tolerebla¹² por delikataj¹³ oreloj...”

Triumfante¹⁴ re-venis la paŝtistoj; kaj, ree, ili mokis la genian¹⁵ junulon. Sed tiu ĉi restis obstina¹⁶. Li plu tranĉis kanojn; kaj, sen-ĉese, li invitis, al ludo, siajn kunulojn.

Fine, ili konsentis; kaj ĉiu el ili el-igis, el la kano, rave dolĉajn sonojn...

Tiel naskiĝis la arta muziko.



PROVERBOJ

*Matena horo estas plena de oro.
Kion oni volas, tion oni povas.
Pli valoras tuj ovo, ol poste
bovo.*

enigmo

KAŜITAJ¹ VORTOJ

La ĉi-suba kvadrato plena de literoj en-havas 10 objektojn, uzatajn² en lernejoj. Serĉu ilin! Por iom helpi al vi, ni mal-kaŝas, ke vi povas legi horizontale, vertikale kaj eĉ diagonale³, en ambaŭ direktoj, sed ne transsaltu literojn!

Sendu vian solvon antaŭ la 15-a de februaro 1976 al *s-ro D. Berndt*, Berolinastr. 2., DDR-102 BERLIN, GDR.

1. tio, kion oni kaŝis / 2. tio, kion oni uzas / 3. X konsistas el du diagonalaj linioj.

Ĝi tute ne ĉesigis la kanton de la birdoj, ĝi ankaŭ ne silentigis la melodian voĉon de la junulinoj. Ĝi vivas, ho saĝuloj de Grekujo! Kaj tiel longe ĝi vivos, kiel longe ekzistos homoj.

1. pra-tempa / 2. fama verkisto de la helenoj (pra-grekoj) / 3. ŝafisto aŭ bovisto / 4. monto-flanko / 5. monto en la antikva Grekujo / 6. kreskaĵo kun longa tubo-trunketo trovebla en malprofundaj lagoj / 7. tia, ke ĝi sentigas grandan plezuron / 8. bel'sona; orel'plaĉa / 9. daŭrigis malgraŭ malhelpaĵoj / 10. inda je alta estimo / 11. baro: sovaĝulo / 12. ne-el-ten'eb-la / 13. sent'ema; akre-senta / 14. havante brilan venkon / 15. saĝega; el-trovema / 16. persistema.

K	G	U	M	O	K	L	C
S	R	K	I	R	K	I	O
P	U	A	E	A	R	N	L
O	T	T	J	M	A	I	E
N	O	E	S	O	B	I	K
G	R	D	K	R	N	L	R
O	A	R	T	O	H	O	I
S	P	O	R	B	I	L	C

La redaktistaro de JUNA AMIKO volas doni al vi pli da ebl'eco el-diri vian opinion. Tial, ni malfermas novan angul'eton sub la nomo: JUNA VOĈO.

La konstanta gvidanto de tiu ĉi fako estas belga amiko kaj nova kun-laboranto: *s-ro Hector Boffejon*, Im Zihl, CH-6204 SEMPACH STADT, *Svislando*. Adresu ĉiun leteron, pri tiu ĉi anguleto, rekte al li! Li volonte respondos pri viaj demandoj.

Leteroj komun'interesaj estos publikigitaj¹ kaj premiitaj per jara kolekto de JUNA AMIKO.

S-ro *H. Boffejon* atendas leterojn ĉefe pri unu el la sekvaj temoj: (a) Kial vi lernas Esperanton? (b) Kia-manjere vi lernas ĝin? (c) Kion vi pensas pri Esperanto kaj pri JUNA AMIKO? (ĉ) Ĉu viaj amikoj lernas Esperanton? Se ne, kial ne? Ĉu vi instigis² ilin? (d) Ĉu vi havas leter'amikojn? (e) Kio estas via ŝat'okupo?

Kompreneble, vi havas la rajton elekti aliajn temojn aŭ, simple, peti informojn pri dubaj aferoj rilate al nia lingvo aŭ al nia movado.

La redaktistaro esperas vidi viajn interesajn leterojn sur la paĝoj de JUNA AMIKO.

Ne domaĝu temperon! Skribu!

1. tio, kion ni publik'igas / 2. vekis intereson.

SOLVOJ:

„Pri ciferoj” (5-a n-ro) — la numero de la loteria bileto: 941.569. Gajnis: AIME KALAMEES, LEMMI JOASSOONE (Estonio); TIBOR SZABADI (Hungario); MIROSLAV HROMAS (Ĉeĥoslovakio).

„Kaŝludo per vortoj” (18-a paĝo): La divenistoj konstatis el la rakonto, ke li renkontis sovaĝajn bestojn, nome: *kolibro*, *simio*, *kamelo*, *kajmano*, *tigro*, *apro*, *elefanto*, *testudo*. Ĉu vi konas tiujn bestojn?

● 15-jara knabo deziras korespondi kun samaĝaj knaboj en la tuta mondo. Skribu al *Christian Hogue*, 12 Nikau Street, PALMERSTON NORTH, *Nov-Zelando*.

● 10-jara knabo, denaska Esperanto-lingvulo deziras korespondi kun samaĝuloj ĉeĥaj, germanaj, francaj, anglaj, slovenaj, aŭ italaj. Adreso: *Zoltan Kurucz*, Hítel u. 10. fszt. 16., H—6000 KECSKEMÉT, *Hungario*.

● Knabino 14-jara volas korespondi kun ĉiuj landoj. Skribu al *Táňa Šimečková*, Julia Fučíka 11., CS—74 601 OPAVA, *Ĉeĥoslovakio*.

● Maria Tomori, 14-jara knabino serĉas leteramikojn en pluraj landoj. Adreso: *Maria Tomori*, Madách Imre u. 1., H—5932 GÁDOROS, *Hungario*.

● 16-jara lernanto deziras interŝanĝi kolorajn bildkartojn kaj korespondi pri muziko, literaturo kaj turismo. Adreso: *Saulius Brazauskas*, Mazupes 9—1, SU—235240 JONISKELIS, *Litova SSR*.



● Tri studentoj 17 ĝis 18-jaraj deziras korespondi tutmonde. Ili kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn, interesiĝas pri muziko kaj sporto. Skribu al *Vojta Sergej*, str. Krasnoarmejskaja d. 5. kv. 67, SU—322021 NOVOMOSKOVSK, obl. Dnepropetrovskaja, *Sovetunio*.

● Junaj bulgaraj lernejanoj volas korespondi kun la tuta mondo. Skribu al ilia kursgvidanto: *Ilja Penev*, 5042 PLAKOVO, Tirnovsko, *Bulgario*.

● Ni petas vin, ke la adreso en koresponddeziro estu skribita legeble, per presliteroj. Alie ni ne povas aperigi vian anoncon.

JUNA AMIKO

Sub aŭspicio de ILEI

Internacia Lerneja Esperanto-Revuo

de la Hungara Esperanto-Asocio (H-1368 Budapeŝt 5. Pf. 193.). Respondeca redaktoro: JOZEFO MÁTEFFY. Redaktoro: GÉZA KURUCZ. Kunlaborantoj: *D. Berndt* (GDR), *H. Boffejon* (Svislando), *M. Boulton* (Anglio), *J. Chvosta* (Ĉeĥoslovakio), *As. Grigorov* (Bulgario), *R. Grinŝpan*, *L. Jevsejeva* (Sovetunio), *E. Linz* (Aŭstrio), *R. Okumura* (Japanio), *G. Ōsz* (Hungario), *B. Ragnarsson* (Islando), *Z. Rehorič* (Jugoslavio), *G. Silfer* (Italio), *J. H. Sullivan* (Anglio), *M. Turin* (Francio), *J. Zágoni* (Rumanio), *W. Żytyński* (Pollando), Grafikistoj: *J. Klement*, *P. Rak* (Ĉeĥoslovakio), *S. Plugor* (Rumanio), *E. Váli*, *Z. Vámos* (Hungario), Lingva revizio: *A. Lienhardt* (Francio), *A. Pechan* (Hungario).

Kiadói Főig. engedélyszáma:
Dürer Nyomda, Gyula

„Kia malĝentil-eco”, grumblis pasaĝero en tramo, „ne ekzistas respekto!”

„Kion vi propre bezonas?” demandis al li apuda pasaĝero. „Junulo cedis al vi sian lokon, kaj vi sidas.”

„Jes,” respondis la unua, „mi sidas, sed mia edzino devas stari.”



humoro

„Hieraŭ mi metis du kukojn en la manĝaĵojn”, diris la patrino al sia filineto; „sed nun, troviĝas tie nur unu kuko. Ĉu vi povas tion klarigi al mi?”

„Jes”, respondis la knabineto, „estis mallume, kaj mi ne rimarkis la alian kukon, tie!”



„Nu, kiel vi sukcesis, hieraŭ, en la ekzameno pri aŭtomobilostirado?”, demandis iu sinjoro al sia amiko.

„Mi ne scias”, respondis la demandito. „La ekzamenanto ankoraŭ ne re-konsciigis.”